# EKO 2025

**Bone greziljone**

EKO 2025-23. Majo 26. Pezo: Word 40, PDF 500 KB, Sen alkroĉaĵo: Sume 540 KB

## La franca somero greziljone

Jen la somera programo de Eo-kastelo Greziljono en Baugé-en-Anjou.

- junio-30 / julio-10:  9-a **Maratona Esperanto-kurso** kaj IEK kun *Dennis Keefe, Nedeljka Ložajić, Frank Lappe*
- junio-30 / julio-07:  89-a IKBE (Internacia Kongreso de **Blindaj Esperantistoj**) de LIBE
- julio-11 / 20: 11-a Interŝanĝoj de scioj kaj faroj (franclingve)
- julio 21 / 31:  46-a Renkonto de **Esperanto-Familioj** REF kaj 15-a Festa Semajno por infanoj kaj familioj
- aŭgusto 09 / 16:  98-a Kongreso de SAT (**Sennacieca Asocio Tutmonda**)
- aŭgusto 24 / 29:  6-a **Verda Naturisma Semajno** kun *INOE, Thierry Spanjaard, Didier Loison*

Kontaktu nin por pli da informoj: kastelo (ĉe) gresillon.org - 06 51 24 24 23
Aliĝu en https://gresillon.org/al?lang=eo - eblas peti prezredukton

## La programo de BET 59

En la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* aperis la provizora programo de la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, kiuj okazos de la 5-a ĝis la13-a de julio 2025 en la universitato Vytautas la Granda en Kaŭno (Litovio) sub la aŭspicio de UEA. Legu la programon ĉe https://sezonoj.ru/2025/05/bet-194/

## Hungaroj majofine festas

La 31-an de majo, la lastan sabaton de la monato, nia amiko Iván Varga denove aranĝos la Majan Renkontiĝon en Bodonhely (MAREBO), nun jam la 27-an fojon. Ni gratulas lin elkore pro ĉi tiu vere impona kaj unika serio kaj la multaj agrablaj horoj, tagoj, pasigitaj tie! La programo estos la kutima: kuirado en pendpoto, mergiĝo en la rivero Rába kaj multaj amikaj babiloj en du lingvoj.

Jozefo Horvath, www.vortaro.hu

## Pri la ĉina poezio

La Libro de Poezio 277 Preta por kamplaboro 诗经277 臣工

https://www.facebook.com/john.huang.6868/videos/1185198129969546/ ...

## Balkane kaj Danube

La 17-an de majo okazis la monata kunsido de la Balkanaj kaj Danubaj landoj. Partoprenis esperantistoj el Bulgario, Bosnio kaj Hercegovino, Grekio, Rumanio kaj Serbio. Aurora Bute malfermis kaj enkondukis la kunsidon. Aranka Laslo rememorigis pri la Esperantaj kursoj en Serbio (novembro 2024 - majo 2025). Andreas prezentis belan materialon pri Esperanto-movado en Grekio, estontecaj laboro kaj kunlaboro. Raia (Bulgario) prezentis la landajn kongresojn en Bulgario kaj Aŭstrio. Maje okazis Eo-kongreso en Hispanio, Kroatio, Bulgario, Aŭstrio, la fervojistoj kongresis en Slovakio, kaj sekvas BET en Litovio, Poliglota renkontiĝo okazos en Ĉehio, Krakovaj Tagoj, la franca, pola kaj itala kongresoj, UK en Ĉehio, ILEI-kongreso en Serbio, SAT kongreso en Francio. Fine ni parolis pri ZEOj en nia regiono, la surdanuba insulo https://esperantisto.hu/insulo-esperanto/.
Ligilo por elŝuti video registraĵon de kunveno estas:
https://1fichier.com/?9mfon0prjdfjgtjivy8t
La venonta Balkan-Danuba kunlabora kunsido okazos sabaton, la 21-an de junio 2025.

## ZEOJ en la hispana fokuso

José Antonio del Barrio parolas pri ZEO-j (Zamenhof/Esperanto-Objektoj),
kiel respondeculo pri la ZEO-Komisiono de UEA, en la Hispana Kongreso en Sorio
https://youtu.be/SlkIQbiYU2U

mga

## Beletra almanako de Mondial survoje

Redaktas: Probal Daŝgupto, István Ertl, Jesper Lykke Jacobsen, Suso Moinos, Nicola Ruggiero, Anina Stecay. La numero enhavas interalie interesajn verkojn de Sten Johansson, Trevor Steele, Mikaelo Bronŝtejn kaj poemon de Humphrey Tonkin. Por mi estas interesa la recenzo fare de Wim Jansen de lingvistika libro de Ryszard Rokicki pri Vortfarado en Esperanto. Estas interesa lingva ludo la enkonduko de la numero fare de Probal Daŝgupto. Li en sia teksto uzas anstataŭ indikativaj formoj de verbo (estis, estas, estos) infinitivojn: "Mi ne esti libera"… "Mia ĉefo jam pli frue plurajn fojojn averti min". Amuze. Recenzo de Debra Hamel pri la (denove) aperinta *La granda kaldrono* de John Francis vekas respekton. La romano mem estas tre ampleksa kaj kompleksa, kaj Debra Hamel detale analizas la rilatojn inter la multaj rolantoj.

Sendis Blazio Waha, Hungario

## Defende pri Artefarita Intelekto (AI)

Mi lastatempe uzis la artefaritan intelekton por transformi 11-paĝan anglalingvan intervjuon kun mi al la persa podkasto (la intervjuo estis farita en la angla por universitata tezo en Hispanio). La rezulto estas mirinda! Tuje, ĉi tiu AI produktis 24-minutan podkaston en la persa lingvo kun voĉoj de virina kaj vira prezentistoj, kies persaj prononco kaj tono estas nekredeble ĝustaj kaj naturaj. Kvankam estas kelkaj etaj eraroj en la podkasto, tamen la teknologio provizas grandan rimedon ankaŭ por tiuj, kiuj ne povas legi kial ajn, trovas legadon malfacila, trovas malfacila komprenadon de kompleksaj tekstoj aŭ ne scias fremdajn lingvojn. Tial la senpaga rimedo estas grava paŝo direkte al edukaj egaleco kaj justeco. Ene de minutoj, la AI produktis 14-minutan podkaston en la angla lingvo bazitan sur la sama 11-paĝa intervjua transskribaĵo.

Ahmad Mamduhi, prezidanto de ILEI.

## Protekti nian heredaĵon

Rilate la arkivon de Prilep, kiun prizorgis Viktor Galeski en Makedonio Norda, mi vizitis s-inon Anita Galeska, la fratinon de Viktor, kiu tenas la kolekton en sia domo. Mia balkana vojaĝo okazis en januaro 2024. Dum la vizito mi konstatis, ke la kolekto en Prilep okupas 5-6 plenajn ĉambrojn, plejparte la materialo troviĝas en ŝrankoj, ordigita, sed estas ankaŭ granda neordigita parto. Grandparte temas pri libroj, amase pri stokoj de nevenditaj makedonaj eldonaĵoj, periodaĵoj, kaj gravaj paperaj dokumentoj kaj fotoj. Al Makedonio Norda mi estis veninta pro la invito de Anita Galeska, kiu volis donaci la kolekton al iu institucio. Ŝiaj provoj fari tion en Makedonio Norda ne donis rezulton, tial ŝi volis donaci la kolekton al Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) en Kroatio. Temas pri ampleksega materialo, pri kiu ne estas certe, ĉu ĝi ricevus permeson de ŝtataj institucioj por translokado eksterlanden, ĉar temas pri nacia kultura valoraĵo. Dum mia vizito mi havis eblon interparoli kun la konata kultura aganto Igor Tasevski (neesperantisto), kiu promesis kontakti kun biblioteko en Prilep por vidi, ĉu tamen oni trovus lokon por akcepti la kolekton. Malavantaĝo estas, ke s-ino Anita volas vendi la domon, tial la kolekto povus troviĝi en danĝero perei, se la domvendo vere okazos. Poste mi kelkajn fojojn demandis al Anita, ĉu estas progreso en la afero, sed ĉiam temis pri negativa respondo. Mi proponis, ke DEC skribu al la Kulturministerio de Makedonio Norda kaj samtempe al la Nacia arkivo en Skopje, por ricevi ilian respondon rilate transporteblon al Kroatio, sed tio ne realiĝis, kvankam mi jam preparis la koncernajn dokumentojn. Mi esploris ĉe *Esperantic Studies Foundation*, ĉu ĝi pretus financi transportkostojn, se la decido pri translokigo al Kroatio vere okazus. ESF pritraktus tiun temon, se ni klarigus la valoron de la kolekto kaj neceson de ĝia translokigo. Konklude, la kolekto en Prilep troviĝas en la sama situacio, se ne eĉ pli danĝera, en kia troviĝas aliaj kolektoj, pri kiuj ne troveblas bona solvo ĉe la esperantistoj mem, sed ne en oficialaj ŝtataj arkivoj. Esperantaj kolektoj estas kompleksaj kolektoj de ĉiaspeca materialo pri Esperanto, kaj estas apenaŭ imageble, ke tian kolekton akceptus iu nacia arkivo, ĉar ĝi ne bezonas la tuton. Estus necese dispartigi tian kolekton al biblioteko, fototeko, dokumentarkivo ktp, kio estus perdo por la movado kaj pereigo de la kolekto kiel tutaĵo.

Josip Pleadin, Kroatio

## Kanada protesto Lumigita




La revuo de la Kanada Asocio en UEA, 'Lumo' pridemandas la psikan staton de la Usona regantaro, kiu feroce atakis la laŭdindan nordamerikan landegon. ***Kio diable okazas en Usono?*** Tiu demando estas ne nur retorika, sed tre konkreta, ĉar mi dediĉis tiun ĉi numeron de *Lumo* al tio, kio okazas en Usono nun. Jen ligilo.

Redaktoro Yevgeniya Amis

## Seula transloĝo

Por gratuli translokiĝon de Seula Esperanto-Kulturcentro (SEK), la prezidanto de Korea Esperanto-Asocio, d-ro Piramido, kaj ĝiaj estraranoj vizitis la centron en la 22-a majo. Mi dankas ilin pro la vizito kun gratul-kuko. Mi esperas, ke la Eo-movado de Koreio pli prosperos kunlabore kun KEA kaj SEK.

Sendis Lee Jungkee

## Ni semas kaj semas konstante

Jen raporto pri la sukceso de la Varbado, konscio kaj instruado de Esperanto en Afriko danke al la subvencio, kiun UEA ofertis por Afriko per la konkurso *Semas 2025.*

Vi trovos du ligilojn: La unua parolis pri la ĝenerala raporto:

https://drive.google.com/file/d/1IQR3Fd7vd5fNZMw3VRYHptPZvO_tIeNL/view?usp=sharing
La dua havas fotojn.: https://drive.google.com/drive/folders/1xJe5tCqnIkkgMeL7-ywIirCpyBHA6K4w?usp=drive_link

La Afrika Komisiono de UEA dankas al UEA pro ĝia subteno kaj petas ĝin revizii la buĝeton asignitan al ĉi tiu projekto estontece.

Manikiriza Aime Patrick

***SMG*** fondis la programon 'Ni semas' antaŭ deko da jaroj. Fine, nur en Afriko ĝi pluvivas por subteni etskalajn projektojn.

## 53-a Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto

Tio okazos samtempe kun la UK en Brno, Ĉeĥio. La ĉi-jara temo estas "Ludo, esploro, aventuro". Ni atendas ĉirkaŭ 40 infanojn kaj adoleskantojn, kiuj parolas Esperanton (minumume – scipovas baze esprimi siajn bezonojn kaj dezirojn en Esperanto). Infanoj kaj adoleskantoj ĝis-15-jaraj estas la kutimaj IIK-partoprenantoj. Adoleskantoj kaj fluparolantoj povas fariĝi helpantoj. Infanoj ĝis 7 jaroj kutime bezonas gepatron aŭ prizorganton dum IIK. Pliaj informoj en la retejo https://iik.uea.org/2025

Fonto: Revuo Esperanto, majo, p. 111.

***SMG*** dum pluraj jaroj (1993-1995) prizorgis IIK, kaj deziras sukceson al la kongreseto!

## La ekskursa propono de la Kongreso de ILEI en Beogrado

Se vi ankoraŭ ne aliĝis, ni varme invitas vin partopreni la ĉi-jaran ILEI-kongreson, kiu okazos en Beogrado (Serbio), de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2025. Ni pretigis allogan **turisman ofertaron** – **karavano al la UK** (Beogrado–Brno), **tuttagaj ekskursoj**, **bankedo** – kiujn vi povos mendi post aliĝo, per aparta **turisma mendilo**. La **dua aliĝperiodo daŭras ĝis la fino de junio**, sed ni instigas vin ne atendi ĝis tiam – **ĝustatempa aliĝo** gravas por sekurigi loĝadon kaj lokon en la turismaj programeroj! Vi trovos ĉiujn informojn en la retejo de ILEI: **https://ilei.info**.

Nome de LKK, Aranka Laslo

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

========= vortoj: 1120 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Dudek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.